# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



PLENUMITA 28/10/2021 Kvincentkvindekkvara eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;


***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **282,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **225,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **196,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde marto 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**



**Esperanta Retradio**


Situacio de loĝado por malfortaj sociaj tavoloj en Ĉeĥio
22a oktobro 2021

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 58 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la tri ĵusaj semajnoj ni menciis kaj preskribis la tutan perfektan verbsistemon de Esperanto, malsaman al tiu de la eŭropaj etnaj lingvoj.

El de ĉi tiu semajno ni priskribos la sistemon de komplementoj al vortoj, al prepozitivoj, kaj al frazpartoj; ĉifoje la Esperanto-reguloj estas egalaj, aŭ preskaŭ, al tiuj de la etnaj eŭropaj lingvoj. Esperanto havas nur kelkajn liberecojn pli, sed ili estas ne konsilindaj.

La lingvo fariĝas pli komplika ju pli da komplementoj oni uzas.

Demando: Kial uzi komplementojn estas pli facila en la skribita lingvo ol en la parolata lingvo?

2). Se en la lingvo unu vorto komplementas alian, tiu unua vorto aldonas signifon al la alia. La signifon aldonanta komplemento nomiĝas Epiteto en ĉi tiu kazo.
La plej ofta formo de tia komplementado okazas inter epiteta adjektivo kaj substantivo, ekzemple "la blanka domo" kaj "fluganta birdo".
Demandoj: A). Donu du diversajn kazojn kie la epiteto ne estas adjektivo kaj kie la determinato ne estas substantivo.
B). En kiuj lingvoj la vicordo de epiteto kaj determinato estas kontraŭa al tiu en la ĝermanaj lingvoj. Donu ekzemplon.

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 554.

*Marcel Leereveld.*


**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

*Australian Citizens Party* *View Email in Browser (enudgemail.com.au)*
Ankaŭ *the Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn.

*Roger Springer*

Unu lastatempa studo, kiu analizis datumojn de la kontaktspura sistemo de Nederlando, trovis, ke vakcinitaj homoj infektitaj de la delta varianto havas 63 procentojn malpli da eblecoj infekti homojn, kiuj estas nevakcinitaj. *Roger Springer*





# La Manlia Esperanto-Klubo



## Rekomencas siajn kunvenojn

La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 6a de novembro estos la unua sabato.

# Universala baza enspezo (UBI)



Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro

Ekonomioj funkcias per la fluo de mono.

Universala Baza Enspezo ebligas ĉiujn havi monon por helpi la fluon de mono.

**Kial la Homaro povas flugi al marso kiam multmilionoj ne havas ian monon?** *Roger Springer*



## Militaj nukleaj ŝipoj estas tre danĝeraj.

### Eĉ se akcidento aŭ misilo estas la kaŭzo

Usona nuklea submarŝipo havis subakvan akcidenton en la Suda Ĉina Maro vundante 11 de sia ŝipanaro.

Oni demandas ĉu la kolizio kaŭzis nuklean likon aŭ difektis lokan maran medion ktp ?

Estas bonŝanĉo ke la akcidento ne estas proksima al la posedanta lando de la ŝipo!!

*The U.S.' nuclear sub accident in the South China Sea is significant - CGTN*




## Dum dekoj da jaroj

La Esperanto ŝloŝila libreto estis havebla ĉe la strato antaŭ mia domo.


Ĉu 300+ kopioj jare estis donaĉprenitaj el mia ĝardeno per interesitaj preterpasintoj.

Nun mi ne havas pli da kopioj kaj la EFNSW ankaŭ ne plu havas kopiojn.

Do finiĝas tiu propaganda periodo.



***Roger Springer***



**3ZZZ** Estas malfacile elekti kaj decido povas havi gravan konsekvencojn . Tion priskribas la elsendo de la 25a de oktobro 21 kaj konfirmas artikoloj pri la pandemio. Informas *Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1). Ĉar oni havas pli da tempo por trovi la signifon.

2). A). "iom peza" k.t.p. kaj "terure malfacile" k.t.p.

B). En la latinidaj lingvoj, ekzemple "*la langue française*".

*Marcel Leereveld.*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



# La malinteligenta nuna

**HOMGENERACIO .**

Pro la klera nuntempa teĥnologio la nespecialistoj inter ni, la granda plimulto estas multe malpli inteligenta ol la antaŭaj generacioj. (eĉ pri la Esperanta gramatiko).

La malnovuloj ricevis tutmondajn malsanojn kiaj la ĥolero, la pesto, la variolo, la influenzoj, k.t.p. Kaj ili sciis, ke se oni ne komplete ekstermas ilin, ili rekreskas kaj kreas variaĵojn por kiuj oni devas trovi novajn injekciojn, ree kaj ree. Kaj tiuj generacioj do ekstermis tiajn malsanegojn. Sed la nuna generacio ne komprenas tion kaj diras ke ni devas "lerni vivi kun la malsanegoj". Iliaj ideoj pri tiuj malsanegoj estas nekredeble malinteligentaj. En Viktorio kelkaj homoj ĝuste komprenas la situacion kaj la danĝerojn, kiel la viktoria registaro, sed ili ne kapablas inteligentigi la reston de Viktorio. "Vivi kun la viruso" signifas ne nur akcepti la regulajn mortojn sed, kio estas pli danĝera, lasi la viruson disvolviĝi al novaj variaĵoj pli rezistemaj. Pro la kulpa malobeado ate de egoismuloj viktoriaj, la registaro neniel povas komplete ekstermi la virusojn (kiel oni faris en Vestralio). Ĝi scias tion sed ne mencias tion publike, por ne aspekti malforta, kaj nun, senespere, akceptas "vivi kun la virusoj". Ili sendube scias, ke la mortoj daŭros, kaj ke ni bezonos novajn injekciojn por peni esti sendanĝeraj kontraŭ la novaj variaĵoj de la viruso.

Se la nuna generacio nur estus same inteligenta kiom la antaŭaj, kiuj lasis al ni senĥoleran-k.t.p-mondon! Kian mondon ni lasos al niaj venontaj generacioj? Mondon kun pluraj variaĵoj de la nuna viruso kelkfoje ne eviteblaj. Kia malbonŝanca antaŭvido por niaj gefiloj kaj genepoj!

*Marcel Leereveld.*

# Itala Esperanto- kongreso

La venontjara Itala Esperanto-kongreso okazos en Brescia. Revu pri vojaĝo al Italio kaj spektu la filmeton en Esperanto pri tiu bela loko.

https://www.youtube.com/watch?v=0a_eEqnjqug



Amike, *Nicole Else*

# Ŝtonado mortigas virinon....".

Kara Marcel, en AE553 vi mencias, ke "la islamanoj en kelkaj landoj per ŝtonado mortigas virinon....".

Jes, bedaŭrinde estas tiel.

Sed ni ne forgesu, kion la Biblio diras pri ŝtonado. Oni legu ekzemple Levidoj 20.2 kaj 20.27 .

Kaj kiam oni jam estas en tiu ĉapitro, eble interesas ekscii pri aliaj krimoj kaj koncernaj punoj, en nia tempo eble 20.13 havas specialan intereson.

Bone, tio estas La Malnova Testamento.

Kion Jesuo opinias pri tiuj leĝoj, oni povas legi ĉe Mateo 5.17,18.

Mi persone ĝojas, ke en multaj landoj oni ne plu sekvas tiujn leĝojn, ke tie oni komprenis, ke mortpuno pro multaj diversaj kaŭzoj ne estas konvena reago al krimo.



Amike, *Peter Weide*